

# Monato

multaj kialoj por legi ĝin ĝuste nun!



Mendu provkempleron ĉe Flandra Esperanto-Ligo,  
Frankrijklei 140, B-2000 Antwerpen, Belgio

## KELKAJ PROBLEMOJ PRI KOMUNIKADO

P. Andres\*

### 1. Enkonduko

Komunikado estas plursenca koncepto. Plej ofte, oni parolas pri lingvistika komunikado, rilate al skriba aŭ al parola lingvosistemo, sed oni forgesas la nelingvistan problemon. Supozu, ke komunikado estus duobla: unuflanke, la gramatika parto, aliflanke, la analogika parto. Tamen, komunikado ne estas tiel simpla, kiel oni povas diri dum 25 minutoj. Rapide, oni povas prezenti komunikadon, kiel plursistemon kun multaj niveloj.

### 2. Interago inter spaco kaj ni

Spaco donas al ni plurajn informojn, kiujn oni devas 'legi'. Ĝi ne estas vakua aŭ neŭtrala kadro en kiu oni evoluas, sed vera kultursistemo en ni, ekster ni, kaj projekcio el ni. Spaco estas samtempe dinamika kondiĉo kaj limo en komunikado. Vere, spaco estas komunika kodo, kiu rilatas al interago inter mondo kaj ni. Por bone komuniki, oni devas scii pri la kulturaj reguloj de tiu, kiu parolas aŭ skribas. Do, oni devas esti konscia, ke oni apartenas aŭ ne al sama mondo.

Ekzemple, la francoj premas la manojn, sed nek la angloj nek la hindianoj faras tion! Se A deziras komuniki kun B, kaj reciproke, ili ambaŭ ne povas ignori tiun regulon, se ne, povus esti obstaklo. Spaco dependas de mia kultura percepto, de miaj konoj pri mia kaj alia kulturoj. Fakte, estas multaj ligiloj inter spaco kaj nia kultura personeco. Unue, oni povas paroli pri "spacoj kun fiksa organizado" [1], ĉar por bone komuniki, oni devas rekonigi nian kaj alian spacojn. Kiam oni veturas tra la mondo, oni konstatas, ke la kutimoj de la popoloj ĉe kiuj oni loĝas, estas malsamaj, ne nur pri lingvoj, sed ankaŭ pri domoj... La hinda domo estas tute malsama al eŭropa domo. Do, se la okcidentanoj ne deziras erari, ili devas esti konsciaj pri tiuj malsimila-

\* San Marino, (SUS 4).

joj. Fakte, ne gravas ne paroli la saman lingvon, sed gravas, almenaŭ en Hindujo, ke viro ne sidu apud virino en aŭtobuso, ĉar korpa kontakto estas malpermesata. Due, oni devas distingi inter “socifuĝaj” spacoj kaj “socipetaj” spacoj. Ekzemple, en la kafeterio de la hospitalo de D-ro H. OSMOND [2], individuoj parolas dufoje pli en F-A ol en C-B ol en C-D:



Tiu ĉi ekzemplo tamen validas nur por tiu ĉi situacio, sed oni scias, ke ekzistas mikrokulturaj spacoj, kiuj influas komunikadon tra multaj variantoj (pozicio de la korpo...). Oni nomas ilin “spacoj kun duonfiksa organizado”. Trie, kiel bestoj, individuoj kreas siajn proprajn distancojn. Finfine, spaco varias laŭ distancoj inter individuoj:

DISTANCOJ (centimetroj)				
MODOJ	Intima	Persona	Socia	Publika
Proksima	0-15	45-75	125-210	360-750
Malproksima	15-45	75-125	210-360	750-

Konscie aŭ ne, oni donas sencon al spaco, aŭ spaco parolas tra nia sperto, kaj nia konduto ŝanĝiĝas laŭ ĉiu ajn situacio: la parolanto adaptas sian voĉon al loko, al publiko... Kulturaj spacoj parolas tra ni, kaj signifas ofte tion, kion oni ne deziras aŭ povas diri.

### 3. Interago inter tempo kaj ni

Kiel spaco, tempo interagis kun ni. Eĉ eblas aserti, ke tempo formas nek eksteran objekton, nek vakuan kadron. Oni estas *en* la tempo kaj tempo

estas *en* ni. Tamen, la gramatika prepozicio ne estas taŭga, ĉar oni projekcias nian propran percepton de la tempo en la mondo. Nun mi deziras nur substreki kelkajn punktojn. Ĉu oni povas paroli pri kronologia tempo? En okcidento, tempo kutimas signifi “mezuron”, sed en aliaj landoj, estas tute malsama koncepto. Ekzemple, en okcidento oni uzas sagon, kiel simbolon, ekde naskiĝdato ĝis morto. Oni dividas ĝin en tri periodoj laŭ kaŭza disvolvado:



Sed ĉu tiu ĉi ĉeno valoras ĉiam? Ĉu A implicas B, kaj B implicas C? Instruistoj notas, ke tiu ĉi maniero konsistigas la klasikan pedagogion por instrui, eĉ nun! la gramatikajn tensojn, almenaŭ en Francujo! Laŭ mia opinio, tempo ne koincidas kun tiuj tensoj. En nia klarega franca lingvo, la konfuzo naskiĝas kun la multaj sencoj de la vorto “temps”, kiu signifas: tempo, vetero, tempformo en gramatiko aŭ pulso en muziko! Fakte, estas multaj malsamaj manieroj vivi aŭ percepti la tempon. La kaŭza ĉeno ne funkcias ekde la maldekstra punkto ĝis la dekstra punkto, sed retroagas ĉiam. Objektiva tempo povus ankaŭ ekzisti (sezonoj, aĝo...), sed oni vivas ĝin diversmaniere, ĉar tempo ne estas nur formala koncepto, eĉ se en niaj eŭropaj landoj, daŭro, rapideco, fragmenteco kaj projekcio en estonteco formas la kvar karakterojn de nia vidpunkto pri tempo.

Oni vivas sian propran tempon laŭ siaj propraj impresoj. Se mi nerveze rigardus mian brakhorloĝon, mi povus opinii, ke mia parolado estas tro malrapida. Unue, urĝeco formas tiun ĉi gravan parton de nia ĉiutaga vivo. Due, en niaj landoj, individuoj ŝatas ne fari plurajn agojn samtempe. Tiu “monokronismo” [3] reguligas nian pensmanieron, nian facilecon aŭ malfacilecon por komuniki. Do, oni ne bone juĝas individuojn, kiuj faras multajn agojn samtempe. Ne estas seriozaj homoj, aŭ kontraŭe, estas tre seriozaj homoj! Ofte, oni deziras diversigi siajn okupaĵojn por eskapi el enuo.

Tempo varias laŭ sociaj cirkonstancoj. Bone komuniki tra la tempa varianto signifas ankaŭ bone akcenti sian paroladon aŭ skribon. Ĝi ne dependas nur de onia subjektiva modo, sed ankaŭ de la intersubjektiva rilato al grupo en kiu oni vivas. Komunikado estas malfermita sistemo ĉiam movebla, en kiu

almenaŭ du individuoj evoluas. Tempo, kiel kultura modo, parolas tra ni. Tio signifas, ke eble oni ne povas paroli pri tempo, sed pri pluraj manieroj percepti la tempon, konscie aŭ ne. Kiel spaco, tempo formas necesas ilon en procezo por komuniki, kaŝi aŭ malkaŝi sin.

#### 4. Kiu komunikas kion?

Kiam ni deziras komuniki, nia korpo, vole aŭ nevole, malkaŝas niajn sekretajn intencojn. Ĝi adaptiĝas aŭ ne al situacio de ĉiu ajn tipo de komunikado. Sed, ĉu oni povas adaptiĝi ĉiam? “Bona” komunikado, bona rilato inter homoj, dependas de nia bona legado de multaj signoj. Estas percepta problemo.

Ni povas difini pozon, kiel ekvilibron de nia korpo, kiam ni staras kun aliaj personoj. Unuflanke, estas malfermita pozo; aliflanke, la fermita pozo. Niaj muskoloj signifas aŭ ne, nian intereson por nia interparolanto. Niaj gestoj ankaŭ influas niajn emociojn. Supozu, ke A estus nervoza, B povus fariĝi nervoza reciproke ĝis la fino de la komunikado. Do, la figuraĵo de la korpo estas grava realeco en la komunika sistemo. Sed ĉu oni povas akcepti aliajn personojn, se oni ne akceptus sin mem?

Oni serĉas “legi” sentojn tra mikroesprimoj de la vizaĝo. Se oni deziras komuniki, oni devas rigardi rekte al aliaj personoj. Per niaj okuloj, ni montras nian superecon aŭ malsuperecon. Rigardi ne nur rivelas psikajn, sed ankaŭ sociajn signojn. Voĉo estas ankaŭ bona spuro por ni. La bruoj, interna kaj ekstera, influas la komunikadon. La ritmo povas signifi, ke ni estas en fermita aŭ malfermita sistemo, rilate al ekstera mondo. Sonkoloro, alteco, forteco de nia voĉo dependas ĉiam de la situacio. Do, oni devas kontroli la signojn de nia korpo kaj de nia pensmaniero, se oni deziras bone komuniki. Ĉiuj situacioj malsamas, kaj neparolaj mesaĝoj povas esti perceptitaj malgraŭ nia volo! Komunikado apartenas al kompleksa sistemo de sociaj interaĝoj, kiuj estas konsciaj aŭ ne, en ĉiuj individuoj. Fakte, individua aŭ kolektiva konduto obeas al sociaj reguloj. Ekzemple, ĉi tie, en San Marino, mi prelegas ĉar mi konformas al la institucio A.I.S. Oni prelegas, ne nur por esti komprenata, sed ankaŭ por esti juĝita. Mi, kiel parolanto, staras en rajta situacio antaŭ legitimaj aŭskultantoj. Mi konformas al rito. Do, oni povas aserti, ke miskompreno inter homoj (eĉ en la sama lando!), devenas de mal-

samaj sociaj ritoj. Feliĉe por miaj gelernantoj (kaj por mi!), ke mi ne devas prelegi sed instrui!

Ne komuniki ne eblas. Ĉiam oni komunikas, nek parolante nek skribante. Mia silento parolas tra mia korpo. Lingvoj estas nur eblecoj kaj limoj per kiuj homoj komunikas. Ĉu la ILO povus esti nur lingvistika solvo? Mi opinias, ke ne, ĉar ILO estas ankaŭ ideologia forteco, kaj rezultas de nia propra kaj intima volo. Sed ne estas vera komunikado se obstaklo!

1. *La kaŝita dimensio*, E.T. Hall, Seuil, Paris, 1971.

2. *La kaŝita dimensio*, E.T. Hall, Seuil, Paris, 1971.

3. *La silenta lingvo*, E.T. Hall, Seuil, Paris, 1984.

#### Bibliografio

BATESON, (1981).

*La nova komunikado.*

Seuil, Paris.

BOURDIEU (1982).

*Tio, kion signifas paroli.*

Fayard, Paris.

GUITTET (1983).

*La Interparolado.*

Colin, Paris.

LO JACOMO, F. (1986).

*Plurlingveco kaj komunikado.*

Selaf, Paris.

SERRES (1984).

*La komunikado.*

Seuil, Paris.

WATZLAWICK (1979).

*Loĝeco de la komunikado.*

Seuil, Paris.

WATZLAWICK (1984).

*La realeco de la realeco.*

Seuil, Paris.

WATZLAWICK (1986).

*La lingvo de la ŝanĝiĝo.*

Seuil, Paris.